

Usona Esperantisto

Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2012:3 (maj-jun)

American Esperantist

Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2012:3 (May-Jun)



EN ASOCIO KUN
ALL FOR GEORGE PRODUCTIONS
SAINT EUPHORIA PICTURES
FIERE PREZENTAS

LA DOMO DE FANTOMOJ

NERVPIKA FILMO KIU
TIMIGOS VIN
ĜISMORTE!

Ĉi-numere:

- Instruado: *Esperanto at the Movies*
- Plena leterkesto
- Vojaĝe: *Nova vidindaĵo ekster Las Vegas*
- ...kaj multe pli!

Baldaŭ debutos alia filmo dublita en Esperanton
helpe de volontuloj de E-USA (pĝ. 13)

Usona Esperantisto

Dumonata bulteno • Bi-monthly bulletin

Vol 51, No 3 — 2012:3 (maj-jun)

Redaktisto • Editor: HOSS FIROOZNIJA

Sendu kontribuojn al • Send contributions to:

✉ bulteno@esperanto-usa.org

✉ Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto (*American Esperantist*) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content two months after publication if you give credit; please send a copy of any reprinted materials to an address above. Opinions expressed are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.



Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retpoŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaprigi materialojn du monatojn post la eldondato, kun fontindiko. Bonvolu sendi ekzemplerojn de republikigita materialo al supra adreso. Opinioj esprimitaj ĉi tie apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktisto aŭ de Esperanto-USA.



Centra Oficejo • Central Office

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA

☎ 510.653.0998; 2510.653.1468

✉ info@esperanto-usa.org

http://esperanto-usa.org

Direktoro • Direktoro, CO: William B. HARRIS

Prezidanto • President: Orlando E. RAOLA

Vicprezidanto • Vice President: Philip G. DORCAS

Sekretario • Secretary: Steve BREWER

Kasisto • Treasurer: Christopher ZERVIC

Aliaj estraranoj • Other board members: George

BAKER, Neil BLONSTEIN, Steven CYBULSKI, D. Gary GRADY,

Tor KINLOK, Julie SPICKLER, Ĝan STARLING, Julie WINBERG,

Christine WINGROVE.

Forpaso: Cecilia WELNA

Nia membro Cecilia "Ceil" WELNA forpasis ĉe sia hejmo en Kensington, Konektikuto, la 8-an de Marto. Ŝi estis 84-jaraĝa. D-ro Welna estis antaŭa dekanato ĉe la Universitato de Hartford, kaj amata profesoro de matematiko dum pli ol kvar jardekoj. Ŝi lernis Esperanton en la somera kursaro ĉe la Universitato de Hartford en la 1990-aj jaroj kaj estis dum multaj jaroj membro de Esperanto-USA. Legu pli ĉe



<<http://hartford.edu/daily/article/view/12475>>.

[Dankon al Humphrey TONKIN pro la informo.]

Korespondi deziras

• Mia nomo estas Roĝero (Rogério), mi estas profesoro en Brazilo kiu deziras kontakti alilandajn esperantistojn.
<criespreg@bol.com.br>

• Mia nomo estas Alexander, mi loĝas en Kubo kaj deziras interŝanĝi mesaĝojn kun aliaj esperantistoj. <unoaudio@enet.cu>

• Mi estas 21-jaraĝa instruistino kaj membro de la Junulara Esperanto Klubo de Shanthi, Sri-Lanko.



Premalatha R.

<info.shanthee2011@gmail.com>

• Mi estas 18-jaraĝa instruistino kaj membro de la Junulara Esperanto Klubo de Shanthi en Sri-Lanko.



W. Malanee

<info.shanthee2011@gmail.com>

We need you! Your membership fees help promote Esperanto and provide services to speakers and students across the country. Members receive the bi-monthly magazine *Usona Esperantisto*, the *Membership List*, discounts from the Book Service, access to online resources (mailing lists, blog space, etc.) and a discount at the national convention. Please join (or renew) today!

Return with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: _____

Address: _____

City & State: _____

Postal code & Country: _____

Phone: _____ E-mail: _____

Birthdate (MM/DD/YY): ____/____/____

In the member list, don't publish my: postal address phone email address

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Please check **one** category of membership/support:

- Friend of Esperanto \$10.00
(not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter)
- Youth (you must be under 27) \$20.00
- Limited Income \$20.00
- Individual \$40.00
- Family \$60.00
- Sustaining \$80.00
- Life (birthdate required) \$800.00

I would like to receive the magazine, *Usona Esperantisto*, in:

Paper form only Electronic (PDF) form only (email address required) Both

Credit card info: Visa Mastercard

Number: _____ Expires(M/Y): ____/____

Card verification #: _____ (three digits on back of card, or on front for AmEx)

Upcoming events

For a comprehensive list of upcoming events worldwide, see <<http://www.eventoj.hu>>.

May 19 – 21 (Quebec City)

Mid-Canada Gathering (MEKARO)

Each May the *Mez-Kanada Renkontiĝo* meets in a Canadian city in the province of Ontario or Quebec. MEKARO is a weekend of tourism via Esperanto that provides opportunities to learn about the host city, sample local delicacies (and beer), and make friends with other Esperanto speakers. This year the gathering meets in Quebec City, one of the most visited destinations in North America due to its history, beauty, and charm. MEKARO isn't just for Canadians: Esperantists from everywhere are warmly encouraged to attend, and participants from the USA regularly take part. For more information, see <<http://mekaro.ca>> or contact <informo@esperanto.qc.ca>.

June 22 – 25 (Dallas, Texas)

Landa Kongreso de Esperanto-USA

This year our National Convention comes to the University of Texas at Dallas (UTD). The program includes a variety of talks, informal get-togethers, games, excursions, and a banquet. Sign up at <<http://esperanto-usa.org/retbutiko>> (click on "National Congress" on the left side of the page). Come join us and help celebrate Esperanto's 125th anniversary! Then, stay for...

June 25 – July 4 (Dallas)

NASK: La Nord-Amerika Somera Kursaro

This year the North American Summer Esperanto Institute (NASK) follows the *Landa Kongreso*—not only in the same city, but in the same building—so you can participate in both events with just one trip. Like last year, NASK now includes eight days of study; those arriving early for the *Landa Kongreso* will have 12 consecutive days in *Esperantujo*. For information on this year's instructors, program details, and fees, visit <<http://esperanto.org/nask>>.

Contact addresses

Addresses for some of the larger local groups that meet semi-regularly. Please send updates to <bulteno@esperanto-usa.org>.

California

Los Angeles: <http://fizzylogic.com/users/bulbul/esperanto/konversacia-rondo>

Sacramento: <http://esperanto.org/us/esos>

San Diego: <http://groups.yahoo.com/group/EsperantoGrupodeSanDiego>

San Francisco:

<http://esperanto.org/us/SFERO>

Santa Barbara: dorothyjeanh@gmail.com

Colorado (Longmont) <http://ek-ek.org>

Connecticut (Wallingford) <http://esne.net>

District of Columbia <http://esperantodc.org>

Florida <http://niasfero.blogspot.com>

Georgia (Atlanta) <http://esperanto-atlanta.org>

Hawaii (Honolulu)

<http://esperanto.org/us/Honolulu>

Idaho (Boise) <http://terpomuloj.org>

Illinois

Champaign-Urbana: <http://ekoci.org>

Chicago: <http://esperanto-chicago.org>

Maine (Bangor, Houlton) <http://esne.net>

Massachusetts (Acton, Amherst, Cambridge, Northampton) <http://esne.net>

Missouri (St. Louis) <http://esperanto-stl.org>

New Jersey (Princeton)

<http://esperanto-nj.tripod.com>

New York

New York: <http://esperanto-nyc.org>

Rochester: <http://esperanto.lodestone.org>

North Carolina (Raleigh Durham)

charles.o.mays@gmail.com

Texas

Austin: <http://esperantaklubo.konfuzo.net>

Dallas: <http://esperanto-tx.org>

Virginia (Hampton Roads) <http://bonege.com>

Washington (Seattle)

<http://seattleesperanto.org>

Wisconsin (Madison)

<http://groups.google.com/group/esperanto-societo-madison>

Esperanto film competition

The Australian Esperanto Association has donated a prize of \$500 to a film competition for the best short film which uses Esperanto as the main part of its dialogue. At least 60% must be in Esperanto. The winner will be announced on July 26, 2012.

Anyone who would like to enter the competition please contact prezidanto@esperanto.org.au.

— *Dianne LUKES, Prezidanto, AEA*
<diannelukes@yahoo.com>

Two ways to help someone learn Esperanto

1. If you find someone who seems interested in learning Esperanto but doesn't have access to a computer or a local class, mention the beginning correspondence course from Esperanto-USA. The fee is \$63 and includes all study materials and a personal tutor. An application blank is available from the administrator Dorothy Holland, at (805) 967-5241 or 5140 San Lorenzo Drive, Santa Barbara CA 93111-2521. If the fee is a handicap, suggest that the prospective student contact Dorothy and apply for a scholarship. (see #2)

2. Make a donation to Esperanto-USA's Goldman Fund, which provides scholarships for prospective Esperanto correspondence course students (Levels 1 and 2).

— *Dorothy HOLLAND* <dorothyh77@gmail.com>

Volontuloj bezonataj en Kalifornio

En Oktobro 2012 okazos en Sanfrancisko kaj Losanĝeleso la 40-a Monda Vegetarana Kongreso. Dum la lastaj kongresoj en Dres-

deno kaj Ĝakarto, Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA) ĉeestis kun budo pri Esperanto. Tamen neniu estrarano iros al la kongreso ĉi-jare. Ĉu vi povos helpi nin? Ne necesas informi pri vegetarismo (tion faras aliaj tie) sed pri nia lingvo, kaj la ebleco uzi ĝin por kontakti aliajn veg(etar)anojn. Do ne necesas esti vegetarano.

Se vi volas helpi tie, bv. kontakti al Heidi GOES <teva@ivu.org>. TEVA provizos vin per senpagaj materialoj (ĉar la vojaĝperiodo de sendaĵoj povas longe daŭri, bv. frue anonci vin!) kaj pagos la kostojn por la budo. Anglalingvaj informoj pri la aranĝo haveblas ĉe <<http://ivu.org/congress/2012>>. Koran antaŭdankon!

— *Heidi GOES* <teva@ivu.org>

Planoj pri NOREK firmiĝas

NOREK (Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Kongreso) okazos de la 28-a ĝis la 30-a de Septembro en Enumclaw, Vaŝingtonio. Enumclaw situas proksime de Seatlo apud Monto Rainier, la fokuso de la ĉi-jara kongreso. Eventoj komenciĝos vendredon per interkona vespero, kaj finiĝos dimanĉon tagmeze. Sabaton ni iros tra la nacia parko Rainier per privataj aŭtoj. Dum la dimanĉa mateno ni havos paroladojn. (La temo estos "daŭrigebla energio por ĉiuj", sed ni bonvenigos paroladojn pri iuj ajn temoj.) La kotizo estos \$20, pagebla surloke. Se vi anticipas partopreni, kontaktu al Arlyn KERR ĉe <norek@morsekob.org>. Nia loka grupo povos helpi vin atingi la kongresan lokon se vi venos al Seatlo per ŝipo, trajno, aŭ aviadilo; ni povos ankaŭ provizi loĝadon al kelkaj partoprenantoj antaŭ kaj post la kongreso. Ĉiuj estos bonvenaj – ne necesas loĝi en la nordokcidento!

— *Arlyn KERR* <norek@morsekob.org>

La kreivo, la noviĝemo kaj Ĵ inventemo: Jen estas la signoj, per kies potenco...

Analizinte la historian evoluon de Usono en la lastaj du jarcentoj, oni povas facile malkovri la absolute fundamentan rolon de kreivo, noviĝemo kaj inventemo cele al ties ekonomia supereco kaj socia disvolviĝo. Inter miaj printempaj legaĵoj ĉi-jare troviĝas interesa libro kunverkita de Thomas L. FRIEDMAN, eksa redaktoro de *The New York Times* kaj Michael MANDELBAUM, profesoro en la ekonomika fakulo de la universitato Johns Hopkins: *Tio iam estis ni: Kiel Usono postrestis en mondo kiun ĝi inventis kaj kiel ni povas regajni elstarecon* (angle: “*That Used to Be Us: How America Fell Behind in the World It Invented and How We Can Come Back*”). La libro analizas tre detale la eblajn kialojn de la nuna socio-ekonomiaj problemoj kiuj malhelpas al Usono daŭre havi pintan pozicion en la nuna mondo. La libro povas vekti konsenton aŭ malkonsenton (depende de la starpunkto de leganto), sed kion mi vere ŝatas en la verko estas la optimisma mesaĝo de la aŭtoroj, ĉar ili same detale priskribas kion fari por eliri el la nuna stato kaj regajni la elstarecon.

Inter iliaj plej gravaj asertoj troviĝas la bezono pliintensigi kaj plivastigi noviĝemon, kreivon kaj inventemon, ĉar ĝuste la abundo de tiuj trajtoj ebligis la kreadon de la nuntempa mondo kaj certigis sukceson al tiuj, kiuj plej multe aplikis ilin. Leginte ĉion ĉi, mi ekpensis: Ĉu ni havas ion por lerni el la moderna historio de nia lando kio estus aplikebla al nia modesta mikrokosmo, tio estas



Orlando E. RAOLA

Orlando estas prezidanto de Esperanto-USA. Li loĝas en Greenbrae, Kalifornio. Vi povas kontakti lin per la adreso:

oraola@gmail.com

Esperanto en Usono? La respondo estas jes, ni nepre estu noviĝemaj, kreivaj kaj inventemaj, ne ĉar ni volas regajni la mondan gvidan pozicion, laŭ la tezo de Friedman kaj Mandelbaum, sed ĉar ni riskas daŭre stagni, malkreski kaj eventuale malaperi. Kompreneble mi tute ne emas sonori falsan alarmon ĉi tie, sed la statistikoj rilate membrokvanton kaj partoprenon en diversaj asociaj agadoj devigas nin ĉiam zorgeme pripensi ĉu ni taŭge plenumas niajn celojn. Ankaŭ mi certas, ke niaj ĉefaj zorgoj ne estas aparte “usonaj”, ja multaj aliaj asocioj en la mondo, kaj ankaŭ nia tegmenta UEA suferas similajn problemojn, sed mi limigos la diskuton al la aferoj de Esperanto-USA.

Jen ekzemploj el kiuj espereble fontu sugestoj por estonta ŝanĝo:

- Ni iom pasive spertis la kreskiĝon kaj pligraviĝon de Interreto kaj de la tiel nomataj sociaj komunikiloj (Fejsbuko, Tvitero, ktp) en la nuna mondo. Tamen ankoraŭ la strukturo de nia membreco en la asocio (tio estas, membrokategorioj kaj maniero fariĝi membro) estas tia, kiun ni evoluigis antaŭ jardekoj, certe antaŭ la naskiĝo de la nun ĉieestanta Tut-Tera Teksaĵo. Kion ni atendas por ŝanĝi la Statuton kaj krei “retan membrecon”?

Kuriero ne episkopas

Mi supozas ke la subjekto de la letero aspektas malĝusta, sensencaĵo. Tamen, tio klariĝos tuj.

En n-ro 2011:6 (nov–dec) estas rakonto titolata *La blanka ĉevalo*, de Filipo DORCAS. Ĝia temo estas ŝakludo. Bedaŭrinde, la aŭtoro ne kontrolis la nomojn de ŝakludaj pecoj. Kvankam angla kaj portugala ŝakludoj havas pecon nomita *episkopo* (*bishop* en la angla kaj *bispo* en la portugala), la Esperanta ne

havas – la nomo de tiu peco estas *Kuriero* en la Esperanta. (Parenteze, la nomo en la franca estas *fou*, kio signifas *freneza*, au eble *ŝercisto* – *jester* en la angla).

Mi scias tion ek de kiam mi legis *The Stainless Steel Rat Is Born*, de Harry HARRISON (1985) en la angla kaj ĝia Esperanta traduko, *Naskiĝo de la Rustimuna Ŝtalrato* (1996). En ĝi iu parolas pri persono kromnomita *The Bishop* en la angla aŭ *La Kuriero* en la Esperanta. La tradukistoj devis ŝanĝi la tekston el “*I don't often go to church*” (au io simila) al

de la prezidanto (daŭrigo)

- En la faka literaturo publikigita en la angla kaj en pluraj naciaj lingvoj oni povas trovi ian bazan sciencon pri gvidado de senprofitcelaj organizoj al pli efika kaj fruktodona laboro. Temas pri sufiĉe konataj aferoj kiel kunkreado de celaro, kunkreado de imagoj pri la estonteco, analizo de fortoj, malfortoj, oportunoj kaj minacoj, kaj simile. La aplikado de tiaj ideoj kaj la trejnado de niaj aktivuloj laŭ la akumulitaj spertoj de homaj grupoj devas trovi lokon inter niaj prioritatoj.
- Kompreneble ni daŭre vivas en mondo kie mono ege gravas, kaj ni revas pri multaj aferoj sed poste ni malrevas kiam ni enkalkulas la eblan koston kaj la maldikecon de nia monujo. Tamen de tempo al tempo per kreivo kaj inventemo eblas atingi aferojn sufiĉe multekostajn sen grandaj elspezoj. Kiel ekzemple faris brazilaj futbalaj fanatikuloj kiam ili sukcesis superŝuti televidstacion per miloj da mesaĝoj

el la tuta mondo petante silentigon de unu el la anoncistoj (vidu <http://ted.com/talks/ethan_zucker_man.html> por rakonto en la angla). La fanatikuloj trompe/ŝerce petis pere de Tvitero al ĉiuj en la mondo sendi la silentigan mesaĝon en la portugala, kaj oni kredigis tiujn kiuj ne komprenis tiun lingvon, ke per tiu mesaĝo ili kontribuas (po dek cendoj por ĉiu mesaĝo) al kampanjo por savi minacitan (kaj tute neekzistantan!) amazonian birdon! Ho, ve! Tute eksterma ekzemplo, mi scias, sed tamen reala kaj realigebla kiam forta volo kuniĝas kun imagemo kaj ĝuste pri tio temas ĉe ni...

Kiam vi legos tiujn ĉi vortojn, jam restos malpli ol du monatoj por komenciĝo de nia jara kongreso en Dalaso. Mi invitas ĉiujn legantojn ĉeesti/partopreni la diskuton pri la vojoj al la estonteco en la laboro de Esperanto-USA. Dum vi pretigas vian partoprenon en la kongreso, bonvolu pensi kreive kaj noviĝeme kaj tio certe helpos al ni ĉiuj trovi la ĝustan vojon por ĉevalkuri antaŭen! ★

“Mi ne sendis multe da korespondaĵoj lastatempe...” pro la malsama nomo de la ŝakluda peco. Nu, mi ĵus trovis ke la Esperanta versio estas legebla senpage ĉe <<http://esperanto.org/Ondo/Rato01>>.

Ironie, sur la paĝo kontraŭa al tiu kun *La blanka ĉevalo* estis la artikolo de Steven CYBULSKI, titolata *Falsaj amikoj*... Mi ĉiam trovas la gramatikajn artikolojn de Steven bone skribitaj kaj instruaj. Kaj la artikoloj de D. Gary GRADY estas ĉiam interesaj kaj pensigaj.

— Mariĵo GRAÇA
<maryjoe@eastlink.ca>

[*Prave, Mariĵo, kaj dankon pro la atento! Mi korektis tiun eraron en la elektronika versio de la bulteno kiu restos en nia baldaŭ preta retarĥivo. Mi ankaŭ bedaŭras ke nia talenta Steĉjo devis adiaŭi sian gramatikan rubrikon, kiun multaj laŭdis. Mi nun serĉas alian gramatikemulon kiu pretas verki regulajn rubrikojn cele al progresantoj. — Red.*]

Papero ankoraŭ gravas

Mi estas maljuna kaj malrapida – por ĉiam kondamnita esti komencanto. Ankaŭ mia komputilo estas maljuna kaj malrapida. Ĝi funkcias per vapore kaj bezonas pli ol naŭdek minutojn por elŭti eĉ malgrandan PDF-dosieron. Mi deziras pli novan komputilon – prefere dizelan – sed mi ne havas sufiĉe da mono. (Enspezo fiksita, vi komprenas. Mi ankaŭ havas nek velboaton nek *Kindle*-on kaj ne vojaĝas per flugiloj).

Klare, la propono de la prezidanto – ke UE fariĝu preskaŭ ekskluzive reta eldonajo (*de la prezidanto*, 2011:5) – ne plaĉegis al mi. Kiam mi lernis la anglan, mi estis instruita per “diagramado de

frazoj”. Mi ankoraŭ uzas tion dum mi klopodas lerni Esperanton.

Por ke mi faru tion, necesas ke mi rajdu sur mulo en urbeton kaj uzu elektran komputilon ĉe la biblioteko por elŭti kaj printi artikolojn. Nun, mia mulo estas ankaŭ maljuna kaj malrapida – sed certe vi komprenas....

— Philip DECAMP
<TwoDeCamps@comcast.net>

La prezidanto respondas

Ho, ve! Mi ja komprenas vian situacion. Kaj por vi kaj por aliaj membroj en similaj situacioj, estus tute facile printi la “bibliotekan” aŭ ni nomu ĝin “arĥivan” kopion kaj sendi ĝin al vi per helika poŝto. Tiel, vi daŭre povos legi kaj aktive partopreni nian laboron, dum la ceteraj, elektronikaj membroj, faras same per uzo de plej modernaj komunikiloj. Kaj ĉiuj estos kontentaj kaj kunlaboremaj! Ĉu konsentite?

— Orlando RAOLA
<oraola@gmail.com>

Kia neŭtraleco por UE?

La artikolo pri “neŭtraleco” (*de la redaktista skribotablo*, 2012:2) estis por mi konvinka kaj bone esprimita. Mi subtenas vian aliron al la problemo. Cenzuro ofte gvidas al eĉ rifuzi agnoski faktojn, ĉar tiu agnosko estas tendenca. Ekzemple, iuj preferas eviti mencion, ke ekzistas memstara registaro en Tajvano, ke iuj protestis en Egiptujo, aŭ ke grupoj kun la nomo “Occupy” agas en diversaj urboj. Viaj gvidlinioj kondukas nin en bona direkto.

— Derek ROFF
<derek@unm.edu>

Esperanto at the Movies

One way of adding a little variety to an Esperanto class or a local group meeting is to watch a bit of a film or television program in or about Esperanto. There are plenty of examples on YouTube and other video sites, ranging from music videos to short films to lessons of greatly varying quality. A YouTube search for the word *Esperanto* produces over 13,000 hits, and while not all are in or about the language as such, the great majority of them appear to be.

Here I'd like to suggest a few longer films containing significant amounts of Esperanto that might make for useful or at least entertaining viewing during a class.

A caution, however: Most of these films are covered by copyright, and while viewing a legally rented or purchased DVD with a small group of people is certainly OK, something that amounts to a public performance is more of a problem both legally and ethically. However, while I'm not an attorney, my understanding is that showing part of a film in the context of a bona fide class is generally considered acceptable. In fact, Section 110(1) of Title 17 of the United States Code specifically authorizes "performance or display of a work by instructors or pupils in the course of face-to-face teaching activities of a nonprofit educational institution, in a classroom or similar place devoted to instruction, unless, in the case of a motion picture or other audiovisual work, the performance, or the display of individual images, is given by means of a copy that was not lawfully made under this title...."



D. Gary GRADY

Gary is editor of the bulletin of the American Association of Teachers of Esperanto (AATE). He lives in Durham, NC.

dgarygrady@frontier.com

Notice that this is more restrictive than it might at first appear. Showing a film during a *kongreso*, for example, probably doesn't come under this exception even if you claim that the purpose is educational. On the other hand, if you show only a relatively small part of a longer film to an audience of limited size, the sources I've checked indicate that this is generally legal. There's unfortunately no hard-and-fast rule, but you can read more on the subject by searching the Internet for "fair use film" or "fair use classroom film."

In any case, there are only a handful of feature-length movies produced entirely in Esperanto, as opposed to containing some bits of Esperanto or dubbed or subtitled in the language. In fact, the list may be as small as these four: *Angoroj* (1964), *Incubus* (1965), *Gerda Malaperis!* (2006), and *La Patro* (2007).

Angoroj is an oddly moody crime film that may not be very suited to teaching purposes because students are apt to find both the dialog and the story hard to follow. This may be a moot question in any case, because the film is difficult to find, though you can see parts of it on the Internet. *Incubus* is both much more readily available and more interesting, especially for the sheer novelty value of seeing a pre-Star-Trek William Shatner speaking Esperanto, or something like it.

The pronunciation is, to be charitable, less than perfect, so it's not ideally suited to class use except as an interesting digression.

Gerda Malaperis! and *La Patro*, both produced by the same team in Brazil, are in quite decent Esperanto, and *Gerda* in particular is pretty watchable. It's of course based on the famous introductory course of the same name created by the late Claude Piron and is consequently very suited to classroom use. The whole film is now available on YouTube thanks to the generosity of the filmmakers, though if you're making classroom use of it you'll probably want to get the DVD (available in the Esperanto-USA *libroservo*). The novel and related materials are likewise accessible both online (at *Lernu!* and elsewhere) as well as from the *Libroservo*.

La Patro, a 40-minute film based on a work of Japanese literature, is something

some students might find a bit heavy going because of the serious subject matter, but it's certainly worth considering. You can find excerpts on YouTube.

There's also an Esperanto course in the form of a television comedy series, *Esperanto: Pasporto al la Tuta Mondo*. As most of you reading this probably know, it was created by Esperanto-USA under the overall supervision of Lucy Harmon and stars a number of U.S. and foreign Esperanto speakers. It's strange (in a good way) and funny and definitely holds student interest. See *Lernu!* and the Esperanto-USA *libroservo* for more information.

There is also at least one readily available feature film available that has been dubbed into Esperanto, an ultra-low-budget parody of 1950s monster movies titled *Attack of the Moon Zombies*. [See page 13! -Ed.] The Esperanto soundtrack is one of the choices on the DVD. The appeal to many students is obvious. The dubbing was done by a number of very active U.S. Esperanto speakers and is quite good. Of course, it's not specifically intended as a teaching tool, so for beginning students it's best limited to short clips.

At least two other feature films have been professionally dubbed into Esperanto. One is *En Eŭropo Ie*, a black and white 1947 Hungarian film about refugees in the aftermath of World War II. While both the film and the dubbing are quite good, the somber subject matter might limit its appeal to students. It's also hard to come by. UEA's *libroservo* has it on PAL (European format) VHS tape but not DVD. (The dubbed version was released in 1987, before the advent of

Senintenca esperantajo?



"Pave", la bakejo kie oni povas manĝi... malmodeste? (Danke al Ray REDD.)

DVDs.) A few minutes of the Esperanto version can be seen on YouTube.

Even harder to obtain is *Mephisto*, a 1981 German film (which won the Best Foreign Language Oscar). Again the film and the dubbing are both quite good, but note that the film does contain some nudity and is probably not suited to younger audiences. I believe the dubbing was done by the same group responsible for releasing *En Eŭropo Ie* in Esperanto.

I've seen pieces of a few Russian films dubbed into Esperanto, but the technical quality of the dubbing was disappointing and I found them hard to watch.

There have been some stage plays performed in Esperanto and made available on video, but once again these seem hard to come by. The one notable exception I'm aware of is a videotaped 1987 amateur performance of an Esperanto translation of Oscar Wilde's *The Importance of Being Earnest*, which is available from the Esperanto-USA *libroservo* on DVD. Also available from the *Libroservo* is a production of a short one-actor play, *La Duonokulvitro* ("The Monocle"), possibly the first original theatrical work in Esperanto. It's not bad, but it's more of historical than dramatic interest. (Then again, that's just my opinion.) It's technically quite competent.

There have been a number of mainstream feature films that make use of Esperanto, for example on street signs or background dialog, usually as a generic foreign language. Two of the best examples in terms of availability and the amount of Esperanto they contain date from just before World War II.

The first is *Idiot's Delight* starring Clark Gable and Norma Shearer. (The title, I'm

glad to say, refers to war rather than Esperanto!) Gable and his troupe of female singers and dancers become stranded in a nameless European country by the approach of war. Esperanto (never identified as such) serves as the language of this fictitious country. There's enough dialog – in excellent Esperanto – to make this definitely worth the effort. (You can also watch Clark Gable perform *Puttin' on the Ritz*, albeit in English.)

The other is *The Road to Singapore*, which launched the long-running "Road" series of Bob Hope / Bing Crosby / Dorothy Lamour musical comedies. When the hungry protagonists crash a South Pacific island feast, they witness a major production number sung in Esperanto that begins *Jen la luno nova*. I have no idea who wrote it, but whoever it was obviously knew the language. The pronunciation is a bit American-accented but otherwise good.

Senintenca esperantaĵo?



Ĉu via vero tro eksmodas? Nu, kial ne aĉeti novan? (Danke al Jessica GRASSO, kiu trovis tiun ĉi vere modan butikon en la ĉefa stacidomo de Berlino.)

Jumping ahead half a century, early seasons of the British science fiction sitcom *Red Dwarf* made some use of Esperanto, and at one point one of the characters, Arnold Rimmer, is shown taking Esperanto lessons on video. (Rather amusingly, his pronunciation is better than that of the teacher, though it's apparent that wasn't intentional.) There's probably not enough Esperanto to make it worth the trouble of showing it, but it might be worth at least a passing mention.

Finally, there are also a few films in which characters are teachers or students of Esperanto. Unfortunately I haven't seen these myself, but they might be worth looking up: *La ciutat cremada* (Spain, 1976), *Vec Vidjeno* (Yugoslavia, 1987), *El coche de pedales* (Spain, 2004), *Populärmusik från Vittula* (Finland and Sweden, 2004).


I've concentrated here on feature films and television comedies, but there are also some documentaries in Esperanto, such as *Flying an Octopus*, available from the *Libroservo*, which has narration in Esperanto.

For more video clips suitable for teaching, *Lernu.net* and *Edukado.net* are probably the best places to start. Otherwise the quality of clips online varies drastically (and some are not appropriate for younger students), so it's best to review them carefully before actually using them in a lesson.

Let me add one additional suggestion: You don't have to limit the use of video to passive viewing. Making a video in Esperanto can be a good class project, or one for a local group, for that matter. For example, why not do one or more

short videos about aspects of your local area and then upload them to YouTube? Computers make editing video very easy, and odds are there's someone in your group or class who's already done it. Just keep in mind that it's important for your audience to be able to understand what's said. The most common mistake is relying on the camera's microphone. (Even an inexpensive one close to the speaker is usually better than one on the camera.) This would be good not only as an exercise but as a way of creating a growing number of interesting video clips in Esperanto. ★

Korespondi deziras



Mi estas fraŭlino, 38-jaraĝa, diplomiĝis el la regula kolegia kurso de la angla fakultato de la Ŝanhaja Normala Universitato kaj laboras kiel administrantino avizanta pri dungado en Ĉina-angla Internacia Kolegio de la Ŝanhaja Universitato de Scienco kaj Inĝenierarto. Mi ŝatas kinon, muzikon, vojaĝon kaj bongustaĵon. Tre scivola, mi interesiĝas pri diversaj aferoj kaj aĵoj. Mi esperus korespondi kun esperantistoj sub 47-jaraj el Usono por formi internacian Esperanto-familion.

Zhao Yijun <tracyzyj@hotmail.com>

Nova Esperanto-Domo en Usono... por fantomoj

Ĉu vi memoras la esperantigitan filmon *Atako de la Lunaj Zombioj*, kiu aperis en la Landa Kongreso en 2011? Ĉu vi scias, ke ĝi poste aperis en kinofestivalo en Brazilo, en la UK en Kopenhago, kaj en aliaj lokoj tra la mondo, kaŭzante amuzon kaj intereson?

Por la sepa sinsekva jaro Christopher R. MIHM el Minesoto, sendependa kreanto de filmoj pri hororo kaj scienc-fikcio verkas kaj produktas novan filmon, kun helpo de la lokaj geaktoroj de Mineapolo. En la repaĝo por la nova filmo ĉe <http://sainteuphoria.com/ghosts.html> aperas la jena priskribo:

Per "La Domo de Fantomoj", sia unua supernatura ekscitiga filmo, verkisto/reĝisoro Christopher R. MIHM omaĝas la verkojn de William CASTLE, la majstro de klasika hororo! Riĉaj mondumuloj Isaac kaj Leigh tradicie gastigas privatajn festojn, kiuj inkluzivas unikajn (kaj altkostajn) distraĵojn. Ĉi-foje ili dungis spiritisman mediumon, kiu promesas "malfermi pardon al la postviva mondo" kaj ebligas al la gastoj, egale originalaj kiel la gastigantoj, kontakti la spiritojn.

Sed antaŭ ol komenci sian prezentadon, la okultisto avertis: post malfermo de la pordo, neniu homo povos antaŭvidi aŭ regi tion, kio trapasos ĝin. Malgraŭ tio, la grupo konsentas, ke li komencu, sed ili seniluziiĝas pri la rezulto... en la komenco. Kaptitaj en la domo de la edzparo pro terura vintra ŝtormo, la festantoj komencas sperti aferojn neklarigeblajn kaj ĉiam pli terurajn. Dum intensiĝas la okazaĵoj, certiĝas ke ia fienco agadas. Ĉu la grupo povos transvivi la



George BAKER

Georgo estas estrarano de E-USA kiu helpis traduki kaj organizi dubladon de la filmo. Li loĝas en Emeryville, CA.

gbakisto@yahoo.com

nokton, aŭ ĉu ignori la averton de la mediumo estos ilia lasta ago?

La filmoj de Christopher R. MIHM estas en la stilo de la 50-aj jaroj, uzante la teknikojn kaj supozojn de tiu tempo. La filmoj ne estas parodiaj, sed omaĝaj al la epoko, kiam espero kaj optimismo gvidis la intrigon, kaj la imagovo pli gravis por eksciti ol filmaj teknikaĵoj. La kostoj de liaj filmoj estas pagataj de la arduloj. La aktoroj kaj kunlaborantoj ricevas kompenso nur per la feliĉo de la kunlaboro, kaj la espero havi belegan rezulton.

Ĉiu filmo estas farita en la angla, sed por la lasta filmo *Atako de la Lunaj Zombioj* Mihm decidis havi esperantan sontrakon. Ĉar la filmo lokiĝas en internacia luna bazo, kaj ĉar optimistoj de la 50-aj jaroj nature supozus uzon de la internacia lingvo de paco por kunlaborado, Mihm ekhavis la ideon uzi Esperanton en la uniformoj de la aktoroj kaj en la scenajoj, eĉ en aparta sontrako por la filmo. Por ne riski la dubindan kvaliton de la filmo *Inkubo*, li petis la helpon de esperantistoj. Artikolo pri la esperantigo de *Atako de la Lunaj Zombioj* aperis n-ro 2011:3 (maj-jun) de *Usona Esperantisto*.

Estis sufiĉe ambicia projekto por komenci, sed pro la malavara helpo de multaj esperantistoj de kelkaj landoj la

rezulto estis kontentiga. La fid-salto alteriĝis bone.

Post la sukceso de la esperantigo kaj la akcepto de sia filmo en Esperantujo, Mihm deziris havi Esperantan sontrakon en la nuna filmo. Do, tuj post fini sian scenaron li sendis ĝin por Esperanta traduko, kaj konstatis sian deziron, ke ni denove voĉaktoru Esperante. Pro la antaŭa sperto ni faris ĝin pli facile kaj bone ol antaŭe. Ekzemple, la Esperanta dublado pli bone konvenas al la lipoj de la anglaj aktoroj. Por solvi tion dum la traduka fazo ni zorgeme nombris la silabojn de ĉiu linio, kaj tradukis la senson per similaj silaboj. Plej ofte tio signifas forlasi superflujajn vortojn en la angla. Kvankam la angla ĝenerale estas pli konciza ol rekta traduko en Esperanto, foje ĝi havas flankajn vortojn. Feliĉe ĉiu ĉefa ideo de la angla teksto aperas en la Esperanta.

La voĉaktoroj estas Duncan CHARTERS, Jennifer BONDELID, Steve WAGENSELLER, Leonora GONZÁLEZ, Miko SLOPER, George BAKER, Maya KENNEDY, Derek ROFF, Max VARAZSLO, Yumiko FUJII, Stephen C. SCHWICHOW, Brandon SOWERS, David E. RUTAN, kaj Kinen CARVALA.

Tradukintoj estas George BAKER, Enrique ELLEMBERG, Derek ROFF, David E. RUTAN, Erin PIATESKI, Duncan CHARTERS, Andrea MONTICUE, kaj Brandon SOWERS. Redaktintoj por la Esperantaj sondosieroj estas George BAKER, Enrique ELLEMBERG, kaj Derek ROFF.

Entute la rilato inter Christopher R. MIHM kaj esperantistoj estas fruktodona kaj kontentiga, gajnante favoran renomon por lia grupo kaj por Esperanto. Oni povas diri, ke li kaj liaj helpantoj en

la filmado estas vere “esperantistoj”, kiuj laboros por la ĝojo de la tasko, kaj la ideo, ke la laboro donos ĝojon al aliaj homoj.

Mihm nun fariĝas lingvan esperantiston, kaj en la enkonduko de *La Domoj de Fantomoj* li mem voĉaktoros Esperante.

La filmo estas en la lastaj stadioj de la produktado. En Mineapolo, ĝia gaja mondo-debuto okazos la 23-an de Majo. En Esperantujo la mondo-debuto okazos preskaŭ samtempe (de la 22-a ĝis 25-a de Junio) en du landoj: en la 60-a kongreso de la Kansaja Ligo de Esperantaj Grupoj en Osako, Japanujo, kaj en la landa kongreso de Esperanto-USA en Dalaso, Teksaso.

Pro la senpagitaj laboroj kaj monkontribuoj de multaj ĝenerale normalaj homoj (kaj ankaŭ esperantistoj!) naskiĝis nova retrostila horor-filmo por stari apud la klasikaj filmoj de la 50-aj jaroj, kiel *The House on Haunted Hill*.

Certe la mesaĝo de Mihm estas, ke la espero kaj optimismo ne eksmodiĝis, kaj purkora laboro beligas la vivon. Do, nepre ĝuu la filmon kiam ĝi aperos en Majo! ★

Ricevu UE-on elektronike!

La PDF-versio de *Usona Esperantisto* estas senpaga por ĉiuj membroj. Se vi ankaŭ ne ricevas ĝin, nepre sendu al la Centra Oficejo vian retpoŝtadreson!

Kontaktu nin ĉe:

eusa@esperanto-usa.org



Nova vidindaĵo ekster Las Vegas: arkopontego

En frua Novembro mia edzo Paul kaj mi flugis al Las Vegas, sed ne por vetludi. Ni celis vidindaĵojn ekster la fama urbo. Jen unu:

Imagu ke vi povus stari 840 futojn (260 metrojn) super la rivero Kolorado kaj rigardi malsupren al unu el la plej ofte vizitindaj lokoj en Usono, la granda akvobarilo Hoover inter la ŝtatoj de Arizono kaj Nevado. Tiu barilo mem staras 726 futojn alta. Konstruite en la 30-aj jaroj, ĝi estas la plej alta betona barilo en Usono kaj ricevas milojn da vizitantoj jare. La barilo regas la riveron Kolorado kaj produktas elektron por la regiono. Ĝi kreis la grandegan rezervujon Lago Mead – kaj dum jaroj ankaŭ grandan trafik-problemon por tiuj kiuj veturigas



Ellen EDDY

Ellen administras la Nord-Amerikan Someran Kursaron. Ŝi loĝas kun edzo Paul en Olympia, Vaŝingtono.

eddyellen@aol.com

aŭtojn inter Phoenix, Arizono kaj Las Vegas, Nevado. La vojo US-93 havas nur du koridorojn kaj serpentumas en multaj lokoj. Unu parto transiras la riveron per la barilo. Aldone al la normala trafiko estis vizitantoj al la barilo mem, do oni ofte bezonis atendi horon por uzi tiun mallongan sekcion.

La problemo de trafikŝtopiĝo solviĝis en la jaro 2010 per konstruado de nova




vidindaĵo tuj apud la barilo, nova arko-ponto oficiale nomita *Mike O'Callaghan – Pat Tillman Memorial Bridge*. La ponto estas parto de projekto krei alternativan vojon superiri la riveron Kolorado. Ĝi estas la unua beton-ŝtala arko-ponto konstruita en Usono kaj la plej longa betona arkoponto en la okcidenta duonsfero. Ĝi estas ankaŭ la dua plej alta ponto en Usono kaj ĝi havas kvar aŭto-koridorojn. Oni bezonas malpli ol minuton por transiri ĝin aŭte sed nun la barilo ne estas videbla pro la altaj flankoj de la vojo. Se oni volas piediri kaj rigardi la barilon, tio eblas. Estas parkejo sur la flanko en Nevado kun ŝtuparo kiu gvidas homojn al la trotuaro. Ankaŭ ekzistas dekliveto por handikapuloj kiuj ne povas grimpi. Oni povas paŝi la tutan longon de la ponto (1 900 futojn / 579

metrojn) kaj rigardi la barilon malsupre kaj legi la metalajn diskojn kiuj klarigas faktojn pri la punta konstruado.

La ponto honoras du homojn kiuj mortis en 2004. Unu estas Mike O'CALLAGHAN, veterano de la milito en Koreujo, 23-a ŝtatestro de Nevado, kaj poste redaktoro de la ĵurnalo *Las Vegas Sun*. La dua estas Pat TILLMAN, fama piedpilkisto de Arizono kaj soldato kiu mortis en Afganujo.

Se vi volas ekscii pli pri la konstruado de la barilo Hoover, valoras vizito al muzeo en apuda urbo Boulder City kiu estis kreita por la laborantoj dum konstruado de la barilo. La muzeo troviĝas en hotelo nomita *Boulder Dam*. Je la fino de via vizito vi povas voĉdoni por via preferata nomo: ĉu *Boulder* aŭ *Hoover*. Eĉ ĝis nun ne estas tuta konsento. ★

New in the E-USA bookstore



DISCOVER ESPERANTO

Esperanto@Internet

A full-color brochure about Esperanto with lots of photographs. Pamphlet. 22 p. 2011.

\$2.50



LINGVA ORIENTADO PER ESPERANTO

E. V. FORMAGGIO

Por la unua-grada lernejo. Gvidlibro por instruistoj kun dulingva teksto en Esperanto kaj la itala. Mola bindaĵo. 78 p. 1995. Italujo. **\$22.60**



LA ALKEMIISTO

Paulo COELHO

Unu el la plej famaj verkoj de la aŭtoro. Surprizoplena aventuro tra la araba mondo. Mola bindaĵo. 158 p. 2007. Brazilo.

\$25.00

More complete descriptions can be found online. If a title is out of stock, the online bookstore can notify you by email when it becomes available again. Thanks largely to fluctuations in the value of the dollar, all prices are subject to change without notice. Order from **Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530**, or online at <http://esperanto-usa.org/retbutiko>.